

n-ro 66

oktobro 1999

La Merkato

ISSN 0941-9306

Membroj atentu!

Hejmenveninte el berlina UK mi konstatis ke parto de miaj kongresaj kasdokumentoj perdiĝis; verŝajne nur tiuj de la vendreda kongrestago. Estas almenaŭ unu nova membro kiun mi, pro perdo de la informoj, ne povis registri. Certe dum tiu tago mi ankaŭ enkasigis kelkajn kotizojn de jamaj membroj.

Bonvolu kontroli la adresetikedon sur la kovrilo. Se la jaro ĝis kiam vi pagis vian IKEF-kotizon ne korespondas kun viaj notoj, bonvolu informi min, indikante kiam kaj kiel vi pagis.

Eble vi efektive ne pagis por la jaro 1999. En tiu kazo mi sugestus ke vi tuj pagu por la jaroj 1999 kaj 2000.

Roland ROTSAERT, kasisto de IKEF <rotsaert(a)esperanto.be>

Enhavo

Raportoj pri Universala Kongreso en Berlino	3-9, 12-14
Kongresaj fotoj	10-11
Ĝenerala Asembleo de TAKE	8
IKEF-kunsido en Azia Kongreso, Hanojo	14
Novaĵoj pri Eŭropa Unio	16
Komercaj petoj kaj proponoj	17
Laborplano 1998-2000	18-19

Novaj membroj 20

La Merkato (LM) (Ĝis numero 26: Laŭokaza Novaĵletero) estas organo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare (jan-apr-jul-okt) kaj servas al la membraro kiel komunikilo. Redaktoro: Roland Rotsaert. Limdato: mezo de la monato antaŭ apermonato.

La **Identecŝildaro** - iam dujara eldono - ne plu aperas. Anstataŭ Ĝi, membroj povas aperigi siajn personajn informojn en La Merkato. Ĉiujare ili ricevas kompletan memroliston.

La **Estraro de IKEF**: S-ro Franz Josef Braun, Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario; S-ro Roland Rotsaert, Financa Konsilanto; S-ro François-Xavier Gilbert; S-ro Zoltan Könyves; D-ro Rainer Kurz; S-ro Wang Tianyi; S-ro Seikō Yamasaki

Revizoro por la financa raporto: D-ro Gianfranco Polerani.

Centra sidejo: Ĉe s-ro F.J. Braun, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl, Germanio.

Financa sidejo kaj membrara administrado:

Ĉe s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio, telefono/fakso/respondilo: +32-50-330004; retpoŝto: rotsaert(a)esperanto.be.

Atentu !

Parto de La Merkato estas sendata tra Flandra Esperanto-Ligo, Antwerpen. Tio estas nur sendadreso; korespondaĵoj senditaj al tiu adreso ja alvenas, sed kun prokrasto. Prefere uzu unu el la supraj adresoj.

IKEF-informoj en Interreto: <http://komerco.com/ikef> [dumtempe ne funkcias]

La jara **membrokotizo** estas 15 eŭroj (EUR) por landoj laŭ UEA-kategorio "A" ("riĉaj landoj") kaj 10 EUR por landoj laŭ UEA-kategorio "B" ("malriĉaj landoj"). Egalvaloro en konverteblaj valutoj (ekz. usona dolaro - USD) kaj internaciaj respondkuponoj (IRK - kun stampilo de eldoninta poŝtoficejo) estas akceptataj. Kurzoj je 6.1999 estas proksimume 1 EUR = 1,05 USD = 1,20 IRK. Dumviva membreco akireblas per unufoja pago egalvalora al 20-obla membrokotizo. Por pago per kreditkarto sendu instrukcion al Flandra Esperanto-Ligo.

Kontoj: - Ĉe UEA kaj FEL: kodo ikef-c
- belga poŝtĉekkonto (Bruselo): numero 000-1592629-83

Perantoj

Belgio kaj internacie: Flandra Esperanto-Ligo (fakso 03-233.54.33, retpoŝto [financoj\(a\)fel.esperanto.be](mailto:financoj(a)fel.esperanto.be), belga pĝk. 000-0265338-43)

Ĉeĥio: S-ro Vladislav HASALA, A. Dvořáka 1, CZ-696 62 STRAŽNICE; tel./fakso/re-g.420-631-332507, retpoŝto [vlada_hasala\(a\)iol.cz](mailto:vlada_hasala(a)iol.cz)

Ĉinio: S-ro WANG Tianyi, Xi'an Jiangong-lu 3, CN-710043 Xi'an, telefono + fakso 0086-29-2232952, retpoŝto [komerco\(a\)public.xa.sn.cn](mailto:komerco(a)public.xa.sn.cn)

Francio: S-ro François-Xavier GILBERT, 33, rue Louvière, F-55190 Void-Vacon (CCP 1275-89 L Nancy), tel. kaj fakso +33(0)3.29.89.82.15, retpoŝto [efik-so\(a\)aol.com](mailto:efik-so(a)aol.com)

Germanio: S-ro Franz Josef BRAUN, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl (Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400), tel. 07223/942064, fakso 942065, retpoŝto [f.j.braun\(a\)t-online.de](mailto:f.j.braun(a)t-online.de)

Hungario: D-ro GETHER István, Palóc u. I, H-1135 Budapest XIII

Italio: D-ro Gianfranco POLERANI, Viale G. Suzzani, I-20162 Milano, retpoŝto [g.polerani\(a\)agora.stm.it](mailto:g.polerani(a)agora.stm.it) (poŝta konto 37485208)

Japanio: S-ro YAMASAKI Seikō, J-185 Tōkyō, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12, retpoŝto [syama\(a\)dokkyo.ac.jp](mailto:syama(a)dokkyo.ac.jp) (pĝk. n-ro 00160-3-253232, kotizo 2200 enoj)

Raportoj pri la UK de Esperanto en Berlino, aŭgusto 1999

Ĝenerala Kunveno de IKEF (mardo, 3 aŭgusto 1999, 11.30 h)

Prezidanto Franz Josef Braun kun ĉeesto de la estraranoj Gether, Gilbert, Kurz, Rotsaert, Yamasaki (mankis nur Wang) malfermis la kunsidon kaj salutis 55 ĉeestantojn, inter tiuj 28 membrojn. Li anoncis la vizitojn je vendredo al la Ekonomia Fakultato de Humboldt-Universitato kaj al la Industria kaj Komerca Ĉambro en Berlino kaj invitis al partopreno. Jen la tagordo:

- 1 - raporto de la prezidanto pri la agado de IKEF en 1998
- 2 - financa raporto de la Financa Konsilanto por 1998
- 3 - decido pri la uzo de la profito de 22314 BEF (553,15 EUR)
- 4 - elektoj al la Estraro
- 5 - diskuto pri celoj, taskoj kaj farotaj agadoj de IKEF (Laborplano 1998-2000)
- 6 - diversajoj

1. Raporto de la prezidanto pri la agado de IKEF en 1998

En sia raporto prezidanto Franz Josef Braun reprenis temojn el la skriba raporto aperigita en numero 64 de "La Merkato" paĝoj 3-7. Li notis stabilan membronombron (136 fine de 1998, intertempe kreskon al 150), kontentigan verkan agadon kaj akuratan aperon de nia interkomunikilo "La Merkato". La terminara laboro estis malhelpita pro la daŭra rifuzo de la terminologiaj instancoj de Eŭropa Komunumo pri partopreno en ties laboro, konkrete en la aliro al ties lingvajn datenarbankojn por aldoni Esperanto kiel 12-an lingvon al la 11 de EU. En speciala kunsido de nia Terminara Sekcio en Berlino ni devos serĉi novan vojon por estonta terminara laboro. La prezidanto informis pri la kunlaboro kun TAKE (Tutmonda Asocioj de Konstruistoj Esperantistaj), kiu evoluas laŭplane. 14 membroj de IKEF estas nun ankaŭ membro en TAKE kaj ĝuas la rabatitan komunan kotiztarifon. En aparta kunsido en Berlino kun la TAKE-estraro la plia vojo de kunlaboro estos fiksita. Apartan substrekon la prezidanto dediĉis al la "Laborplano 1998-2000" lastjare en Montpeliero akceptita de la Ĝenerala Kunveno. Por ne disipi niajn fortojn, ĉiu membro nepre koncentru sian agadon al tiu laborplano, farante iun por si elektitan agadon el la laborplano, kiu pleje rilatas al siaj profesia laboro kaj/aŭ personaj spertoj. Braun denove deklaris tre

valora la gajnon de entreprenistoj kiel simpatiantoj al Esperanto, kiuj povus esti sponsoroj por Esperanto, i.a. per reklamanoncoj en Esperantlingvaj revuoj.

2. Financa raporto de la Financa Konsilanto por 1998

La Financa Konsilanto, s-ro Roland Rotsaert, prezentis kaj detale klarigis la ciferojn de la kontoj jam prezentitaj en "La Merkato" numero 64, paĝoj 10-11. Li montris sin kontenta pri rezulto kaj gajno preskaŭ samsuma kiel en la antaŭa jaro kaj li atentigis pri tio, ke IKEF povos elspezi iom da mono por speciala promesplena agado proponota de iu membro al la estraro. Laŭplane la kontotenado de IKEF ekde 1999 okazas ne plu en BEF sed en EUR.

Lau propono de s-ro Laurence Mee kaj la agadraporto kaj la financa raporto por 1998 estis unuanime aprobitaj de la ĉeestantaj membroj.

3. Decido pri la uzo de la profito de 22314 BEF (553,15 EUR)

La financa profito de 22314 BEF estos aldonita al la kapitalo.

4. Elektoj al la Estraro

La oficperiodo de la estraranoj d-ro Gether, s-ro Gilbert, s-ro Rotsaert kaj s-ro Yamasaki finas en julio 1999. Dum d-ro Gether ne plu kandidatiĝis, la aliaj tri estraranoj denove kandidatiĝis por la estraro. Ĉiuj tri estis unuanime reelektitaj de la Ĝenerala Kunveno. Kiel nova kandidato anstataŭ d-ro Gether prezentis sin s-ro Zoltan KÖNYVES, memstara entreprenisto el Hungario. Li estis unuanime elektita nova estrarano.

5. Diskuto pri celoj kaj farotaj agadoj de IKEF; diversajoj

La diskutaj kontribuoj el la ĉeestintaro koncernis plimulte du temojn: retpaĝoj de IKEF kaj terminara laboro.

a) **Retpaĝoj:** Antaŭ du jaroj s-ro Bent HOLM kreis retpaĝojn por IKEF. Li estis multe laŭdata pri tio. Sed bedaŭrinde lastatempe li nek aktualigis ilin nek donis deklaron pri sia sinteno. Post multe da diskutado pri la nepra neceso de informaj kaj ĉiam aktualaj retpaĝoj por IKEF, s-ro Georges D. Winkler el Liĥtenstejno (Kongresnumero 1017, ankoraŭ ne IKEF-membro) kiel

fakulo pri tiaj aferoj deklaris sin preta ellabori taŭgan retpaŝan sistemon por IKEF. Flanke de la estraro responsos d-ro Rainer Kurz pri tio. Do, s-ro Winkler prezentos sian proponon al d-ro Kurz. Post ilia interkonsento pri taŭga sistemo la estraro decidis.

b) Pri **terminara laboro** okazis post la Ĝenerala Kunveno speciala kunsido en Berlino. Pri tio bonvolu legi raporton aliloke en ĉi tiu kajero. Bonŝance du novaj volontulaj kunlaborantoj anoncis sin.

Al demando pri venontjara Ĝenerala Kunveno, la Estraro surloke decidis unuanime laŭ propono de s-ro Yamasaki, ke en la jaro 2000 IKEF okazigos Ĝeneralan Kunvenon kadre de la UK en Tel Aviv.

fjb

Akcepto en la Ekonomika Fakultato de Humboldt-Universitato

(vendredo, 6 aŭgusto 1999, 10.00 h, organizita de profesoro Bengt-Arne WICKSTRÖM, membro de IKEF; partoprenis 21 personoj)

Franz Josef Braun, prezidanto de IKEF, prezentis la asocion IKEF. Bengt-Arne Wickström, ekde 1992 profesoro pri ekonomiko (la ekonomiko de la publika sektoro) en Humboldt-Universitato, donis ĝeneralan prezentadon pri ties Ekonomika Fakultato kaj anoncis la postajn detalajn informojn pri la opaj studprogramoj.

La fakultato estas tre juna (fondita 1991), sed kun la tradicio de la iama, 1906 fondita Komerca Altlernejo Berlin kaj de la iama 1896 en Humboldt-Universitato fondita seminario pri la sciencoj de la stato. Bazaj fakoj pri studado estas ekonomiko, komerco kaj manaĝera scienco. Nun ĉirkaŭ 25 profesoroj esploras kaj instruas en la fakultato. La gestudentoj frekventas dum minimume kvar jaroj la diversajn fakojn por diplomiĝi. Por doktoriĝi necesas kromaj tri ĝis kvar jaroj. La aspirantoj por la magistra studprogramo 'ekonomiko kaj manaĝera scienco' jam havas minimume du-jaran antaŭan studadon, kiam ili komencas la programon en Berlino. Ili venas el la tuta mondo: Azio 35 %, Germanio 20 %, iama Sovetunio 10 %, cetera Eŭropo 25 %, Ameriko 10%. La kursoj en tiu studprogramo okazas en angla kaj germana lingvoj.

Poste gestudentoj de la fakultato prezentis germanlingve

jenajn specialajn programojn; profesoro Wickström tradukis Esperanten:

- 1) funkciado de la "asocio de gestudentoj", i.a. projekto por prijuĝo de profesoroj;
- 2) internaciaj rilatoj, i.a. programo pri interŝanĝo de gestudentoj kun aliaj universitatoj, Sokrates-programo promociita de Eŭropa Unio;
- 3) doktoreca programo pri aplikata mikroekonomiko;
- 4) doktoreca programo pri informistemoj;
- 5) 'Speciala esplorkampo 373' de la Germana Esplorkomunumo (DFG) pri "Kvantigado kaj simulado de ekonomiaj procezoj". Ĉefa celo de tiu projekto estas ekkono de la ŝanĝanta ekonomia dinamiko ekzemple por la labormerkato, la nova kapableco de ekonomiaj strukturoj, k.a.

Fine la ĉeestintoj vizitis la 'kapelon', t.e. la plej malnova preĝejo, fakte la plej malnova ankoraŭ ekzistanta konstruaĵo, en Berlino el la 13a jarcento, kiu troviĝas sine de la Ekonomika Fakultato. Tie profesoro Wickström laŭdinde kaj dankinde gastumis ilin per bongustaj piceoj kaj vino. Dum la manĝado la vizitintoj havis la ŝancon diskuti kun la studentoj pri detaloj.

Pliajn informojn pri Humboldt-Universitato kaj la Ekonomika Fakultato oni povas trovi en la reto sub la adreso <<http://www.wiwi.hu-berlin.de>>.

FXG/FJB/BAW

Akcepto en la Industria kaj Komerca Ĉambro en Berlino

(vendredo, 6 aŭgusto 1999, 14.00 h)

Partoprenis 19 personoj. Akceptis la grupon d-ro Manfred KERN-NELLE, estro de la stabo pri nacia ekonomio. Sur la tablo estis ofertitaj diversaj trinkaĵoj.

Franz Josef Braun, prezidanto de IKEF, prezentis la asocion IKEF. Komence s-ro Kern-Nelle prezentis la organizon de la Ĉambro, kiu funkcias laŭ naciaj leĝoj en nacia strukturo. La areo de ĝia kompetenteco kovras la du federaciajn landojn 'Berlino' kaj 'Brandenburgio'. Ĝi arigis en 1989, tuj post la politika turniĝo, 80000 firmaojn, nun en 1999 130000; la pluso

venis el la orienta parto.

La organiza strukturo de la Ĉambro montras 6 kampojn laŭ afergvidantoj:

- 1) industrio, servoj;
- 2) komerco, trafiko, turismo, gastigado;
- 3) planado, medio, juro, financo;
- 4) klerigado kaj profesia formado;
- 5) ekonomiaj promocio kaj konsilado;
- 6) centralaj funkcioj;

kaj 2 stabaj kampoj

- 1) nacia ekonomio;
- 2) publikaj rilatoj.

Poste d-ro Kern-Nelle montris pere de lumbildaj kurboj la evoluon de la ekonomia aktivado de 1996 ĝis julio 1999. Ĉiu partoprenanto ricevis broŝuron, en kiu troviĝas la prezentitaj ciferoj. Tial ni citas ĉi tie nur kelkajn gravajn. La komparo de la ekonomio en Brandenburgio (iam socialisma) kun Berlino (iam okcidente libermerkata kaj oriente socialisma) permesas konstati kelkajn fundamentajn malekvilibrojn:

Loĝantaro de Berlino	3,5 milionoj
Loĝantaro de Brandenburgio	2,7 milionoj

Perkapa MEP (Malneta enlanda produkto):

en Berlino	127.000 DEM
en Brandenburgio	76.000 DEM
por komparo: en Germanio entute	112.000 DEM

Senlaboreco:

en Berlino	16,0 %
en Brandenburgio	17,0 %
por komparo: en Germanio entute	10,5 %

D-ro Kern-Nelle menciis, ke dum 40 jaroj (1949-1989) okcidenta Berlino vivis kiel insulo. La iama (antaŭmilita) granda industrio iom post iom reduktiĝis kaj migris al okcidenta Germanio; tiel ke la germana ŝtato subvenciis okcidentan Berlinon. Post la reunuiĝo en 1990 de Germanio kaj ankaŭ de Berlino tiuj subvencioj nun forfalas; Berlino devas memstare

majstri sian ekonomian vivon. Tio lastatempe kondukis al tio, ke nova industrio ekestis ne en Berlino mem, sed en la najbara (Berlinon ĉirkaŭanta) lando Brandenburgio, kie la salajrokostoj kaj impostoj estas malpli alta ol en la nova germana ĉefurbo. Ekzemple la "metia imposto" (germane: Gewerbesteuer) estas en Berlin kvaroble pli alta ol en Brandenburgio. Do la ekzisto de du federaciaj landoj kreas misan konkurencon. Sed unuiĝon de ambaŭ landoj rifuzis la loĝantoj en referendumo antaŭ du jaroj.

Jen la strukturo de la ekonomia produkto en Berlino: industrio kaj produktanta metio 33 %, servoj 36 %, komerco kaj trafiko 13 %, ŝtataj servoj 18 %. Laŭ oficiala prognozo oni tamen estas optimisma pri la estonta evoluo de la ekonomio en Berlino. Tiu prognozo montras, ke la parto de industrio plie falos, dum la parto de servoj (aparte altkvalitaj ĉefurbaj) plialtiĝos.

Post la prezentado de d-ro Kern-Nelle la ĉeestantoj faris multajn demandojn, al kiu li afable kaj profunde respondis. Prezidanto Braun, kiu kune kun IKEF-estrarano d-ro Rainer KURZ estis interpretinta la paroladon germane-Esperanten, dankis al d-ro Kern-Nelle kaj transdonis diversajn traduklaborojn faritajn de IKEF-anoj.

FXG

Lastminute

Sadegh Karami (IKEF 286) ofertas plejbonkvalitajn grajnojajn kaj sekigitajn fruktojn iranajn (FOB aŭ C&F). Telefono kaj fakso: 0098-21-2086574; retadreso: <s-karami(a)neda.net>

Nia Esperanto-Domo en BiH-79285 SANICA (Bosnio kaj Hercegovino) dum militaĉo en Bosnio estas detruita. Mi serĉas esperantistojn kaj homojn kun bona volo por rekonstruado. Se vi havas volon helpi, bv. skribi al SMOLIC Drago, Riemekestr. 3, D-33102 PADERBORN; tel. 05251-23527, fakso 26981.

IKEF/TAKE: Ideo-interŝanĝo pri la kunlaboro

(mardo, 3 aŭgusto 1999, 16.00 h)

Ĉeestis: Braun, Gilbert, Grossmann, Könyves, Ludwig, Rotsaert.

Antaŭ la kongreso jam estis 14 komunaj membroj en IKEF kaj TAKE. Pliaj anoncis sin dum la kongreso. Dum la jaro aperis kelkaj neantaŭviditaj problemoj. La kotizoj nun estas fiksataj en eŭroj:

landokategorio A 27 EUR (15 por TAKE, 12 por IKEF)

landokategorio B 18 EUR (10 por TAKE, 8 por IKEF)

Dumvivaj membroj pagu (kiel jam estis ĉe IKEF) 20-oblon de jara kotizo. Komuna membro kiu nur estas dumviva membro de unu asocio, jare pagu la partan kotizon de la asocio kies dumviva membro li ne estas.

Estis decidite daŭrigi la kunlaboradon kaj celi komune du ĉefajn agaderojn:

- 1) organizado de komunaj fakseminarioj (ideoj bonvenas!), kaj
- 2) havigo de staĝoj en diversaj landoj al junaj metilernantoj, fakliceanoj kaj studentoj.

Helpantoj en diversaj landoj sin jam anoncu ĉe Edmond LUDWIG (TAKE - LA DOMO), 26 route de la Schlucht, FR-68140 STOSSWIHR; tel/fakso : +33 (0)3 89 77 52 56, rete <take.ladomo(a)wanadoo.fr> kaj www.komerco.com/.

RR/EL

Ĝenerala Asembleo de TAKE - LA DOMO en Wintzenheim, Francio

Dimanĉe la 19-an de septembro 1999 kunvenis ĉefe lokaj kunlaborantoj de TAKE (Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj) kun la partopreno de S-ro Franz Josef BRAUN, prezidanto de IKEF.

La decidoj de tiu kunveno estis la jenaj :

- kuraĝigi novajn komercistojn, surmerkatigi siajn varojn kun Esperanto-etikedoj aŭ kun la vorto ESPERANTO. Ĝis nun vendiĝas vinoj, mielo, pomsuko, laborgantoj al esperantistoj kaj - kio ankoraŭ pli gravas - al ne-esperantistoj.
- havigi al la Esperanto-grupoj reklamilojn. (Nova, moderna flago estas havebla ĉe TAKE.)
- organizi kune kun IKEF prifakajn prelegojn kaj konferencojn,
- serĉi ĉe eksterlandaj firmaoj (kune kun IKEF) staĝlokojn por junaj studentoj kaj metilernantoj,
- serĉadi en la esperanto-grupoj fakulojn pri plej diversaj fakoj por

verkado de artikoloj en LA DOMO, la revuo de la profesioj kaj de la servoj, kaj partopreno en terminologia laboro.

- eldoni novan fakvortaron pri vinkultivado kaj enologio kaj daŭrigi la terminologian laboron helpe de TTT-paĝo kreita de nia juna vicprezidanto Fabien van Mook.

La kunveno estis agrablighita pro la ĉeesto de fraŭlino Imsuk JUNG el Koreio, kun kiu niaj junaj kunlaborantoj vigle diskutis.

Edmond LUDWIG,, 26, route de la Schlucht, FR-68140 STOSSWIHR
tel./fakso : +33 (0)3 89 77 52 56; rete <take.ladomo(a)wanadoo.fr>

Terminara laboro de IKEF (mardo, 3 aŭgusto 1999, 17.00 h)

Ĉeestis: Bormann, Braun, Cwik, Gilbert, Polerani, Rotsaert, Yamasaki.

Braun: Ĉar ne eblis akiri oficialan permeson por traduki EU-terminarojn, ni devas rezigni pri tiu vojo. Cwik tamen esplos ĉe EU-instancoj kiel eblas akiri 'utilajn' terminojn el la termino-datumbazo de EU.

Yamasaki proponas traduki Incoterms (broŝuro de ICC - Internacia Komerca Ĉambro, kiu donas detalajn klarigon pri la terminoj/mallongigoj menciitaj komence de Key Words). La etformata broŝuro enhavas pr. 100 paĝojn. Oficialaj lingvoj estas franca kaj angla, sed ekzistas neoficialaj tradukoj en multaj lingvoj. Nova versio aperos en septembro 1999. (Ret-paĝoj de ICC por aktualaj informoj: www.iccwbo.org) Eble IKEF por tiu traduko kunlaboru kun Esperanta Jura Asocio (EJA).¹

Eĉ post longa diskutado oni ne trovis interkonsenton pri la utilo de tiu laboro. Tial oni decidis fari provan tradukon de unu paĝo, t.e. Incoterm "CIF" el la eldono 1990. Post tio, kaj post la havigo de aliaj gravaj informoj, oni definitive decidis pri la efektivigo de tiu plano.

Yamasaki kompletigos ICC-formularon per kiu IKEF petas permeson por Incoterms-traduko; Gilbert transdonos ĝin al ICC.

Bormann informpetos pri komputilistoj por eltrovi taŭgan,

¹Laŭ informo de André Ruyschaert, sekretario de EJA, tiu temo ne estis traktita en poste okazinta EJA-kunveno. (rr)

unuecan metodon por registri terminojn. Li menciis la terminaron de la fervojistoj kaj proponis kontakti ilin por lerni el ties spertoj.

Braun menciis la 'Borsan Terminaron' de s-ro Hans Wiersch, ĵus ricevitan en malneta broŝurita eldono. Ĝi enhavas 1188 bazajn terminojn en germana, Esperanto, franca kaj angla. Mankas la franca kaj angla indekso. Plie li volas aldoni la nederlandan kaj poste serĉi eldoniston. Helpo de IKEF aktuale ne necesas.

Braun ankaŭ anoncis ke s-ro Ulrich Fellmann pretas kunlabori en la Terminara Sekcio. Adreso: Homburger Landstr. 168, D-60435 Frankfurt am Majn.

Rotsaert kaj Yamasaki post la kunveno mallonge parolis pri ebleco esperantigi vortliston anglan-francan (700 mots d'aujourd'hui pour les affaires).

rr/fjb

fotoj

fotoj

Terminologia Kunveno (ĵaŭdo, 5 aŭgusto 1999, 9.00 h)

Gvidis d-ro Chrdle; entute ĉ. 90 partoprenantoj (sed ne ĉiuj restis dum tuta kunveno).

Wera Blanke skizas evoluon de la terminologio en Esperantujo

La Akademio ne havas aktivan rolon, sed sekvas la evoluon. ISAE jam en 1909 kreis principojn por kunmeto de terminaroj. Poste Akademio kaj ISAE (per R. Eichholz) kunmetis bildvortaron kaj Pekotekon. Wera Blanke por UEA ekpreparis la vojon. UEA kreis en 1982 eldonan centron en Budapeŝto, kiu ankaŭ okupiĝis pri terminologio (malfondita en 1985). Dum UK de Augsburg (1985) ekestis la bazo por TEC (Terminologia Centro de UEA). Evidentiĝis ke la TEC-projekto estis tro ambicia; kiam ĝi sur realisma bazo ekstartis en Jugoslavio, ĝia agado preskaŭ tuj estis malhelpita pro tiea milito. Esperanto havas regulajn kontaktojn kun TermNet (Vieno), lastfoje en 1998. Pasintjare UEA eldonis terminologian gvidilon.

Christian Kiselman parolas pri la revizio de la partoj matematiko kaj statistiko de PIV

En 1991 la unuajn petojn por re prilabori la enhavon estis dissenditaj al fakuloj. En 1997 la lasta modifita propono pri statistiko estis resendita al la respondeculoj (Michel Duc Goninaz kaj Claude Roux). Por PIV ne eblas ĉion priskribi tiel detale kiel en faka terminaro, ekzemple estas mez(o)nombro, mezvaloro, mediano, mezumo, averaĝo... Demando estas kiel decidi pri la 'ĉefa' termino?

Kelkaj bazaj principoj: manlibra difino malsamas de vortara difino; scienca difino ne eblas en vortaro; laŭeble estu uzataj ekzistantaj vortoj; gamo de akcepteco: fundamenta - oficiala aldono - zamenhofa - akceptebla.

Lluís de Yzaquirre i Maura <de yza(a)upf.es>: Neŭtralaj Lingviloj por la Plimulto; rolo de teknologio en estonteco

ISO-komitato 37 (nun prilaborata) traktas proksimume 400 lingvojn. Irendaj vojoj:

- voĉrekonado: ni konigu nin, por ke produktantoj ne forgesu Esperanton, sed lasu en siaj programoj lingvo-elektablecojn;
- komuna formato: ne ekzistas por Esperanto, sed sistemo

malferma ankaŭ al aliaj lingvoj ĵus estis akceptita por hispana lingvo (Barcelono 7/99);

- TEI: interuniversitate akceptita registradsistemo;
- revo: ekzemple Unesco kreu lingvilon por minacataj lingvoj (situacio de la katalana multflanke similas al tiu de Esperanto).

Karl-Herman Simon, Ingward Ullrich (?): Forsta Terminaro (Lexicon Silvestre) (forsto = sisteme mastrumata arbaro)

Originas en Ĉeĥio, 1981, kun 'Forstista Informilo' kiel ligilo de kunlaborantoj. Ĝis 1985 estis nur esperantista projekto; en 1992 aperis multlingva vortaro.

Fervoja Terminaro (Inĝ. Ištvan Gulyas, vicprezidanto de IFEF)

Jam en 1905 IKEF eldonis terminaron. De kelkaj jardekoj ekzistas 'Lexique Général' de UIC, Parizo, komence 5-lingva, en 1989 jam 12-lingva, inkluzive de Esperanto. Elektronika versio en 1997 ekzistis en 14 lingvoj. Aktuale haveblas sur CD-ROMo (kompleta), sur diskedo, per plurlingvaj libroj.

Diskuto (nur ĉefaj intervenantoj)

Sandra Schweber (Universitato de Hildesheim) faris studfinan laboraĵon en kiu ŝi analizis fakajn terminarojn, i.a. la E-terminojn por komputado.

Detlev Blanke bedaŭras ke ne estis uzataj vortaraj principoj por reviziado de PIV. Manuskripto pri ĉiuj haveblaj vortaroj (de Edward Oki?) estas ĝisdatigota. Estas bezonata cirkulero pri terminologio. Pledas por konservi TEC: ĝi faris gravan laboron kaj malfermis pordojn.

Rüdiger Eichholz ankaŭ pledas por konservi kion ni havas. La kaoso en komputilaj kodaĵoj malebligas daŭrigon de Pekoteko tra interreto. Kvankam ekzistas Unikodo, ĝi ne estas ĝenerale uzata. (Post la kunveno Roland Rotsaert sugestis al Eichholz almenaŭ interrete disponigi la Pekoteko-dosierojn, eĉ en originala WordPerfect formato: kostas preskaŭ nenion kaj tiel informoj alireblas por interesitoj.)

Laŭ Petro Chrdle kodado estus temo por specialista kunveno. Tamen, li (kiel eldonisto) ne havas gravajn problemojn por rete interŝanĝi tekstojn. Li rekomendas la x-transskribon kaj aron da makrooj.

Jan Werner (TU Brno) ankaŭ rekomendas ne malfondi TEC. Atentigas pri diferenco inter terminologio (per nocioj, se necese terminoj estu kreaĵoj) kaj leksikografio (surbaze de fontoj).

Chrdle konkludas:

- oni ne malfondu TEC, sed revivigu ĝin;
- terminologia konferenco estonte estu regula UK-programero;
- ĉiuj partoprenantoj ricevos informojn.

Postskribo de la raportanto

Bedaŭrinde estis farita neniu propono pri ĝenerale uzotaj programo kaj datumbaza strukturo (ankaŭ uzebla interrete). Tio ne nur malhelpas al novaj projektoj, ĉar iniciatintoj dubas pri uzotaj teknikaj rimedoj, sed eĉ ne eblas bonorde registri kaj interrete disponigi jam ekzistantajn terminarojn.

Roland ROTSAERT

Forumo de fakaj asocioj (lundo, 2 aŭgusto 1999, 14.00 h)

Ĉeestis pr. 50 personoj por interkonatiĝo kaj interŝanĝo de ideoj. Roland Rotsaert (IKEF) atentigis pri la problemoj, kiun asocio havas por bone prezenti siajn informojn tra interreto. Kapablaj kaj fidindaj volontuloj maloftas.

Laszlo Szilvasi (revuo Eventoj) prezentas la servojn kiun li povas liveri. La revuo aperigas informojn de fakaj asocioj. La budapeŝta E-domo (kunlabore kun UEA) havas projekton 'savu nian kulturon' por redisponigi fakan literaturon, enkomputiligante ne plu haveblajn verkojn aŭ konservante verkojn kiujn sendis aŭtoroj en elektronika formo, cele al iama aperigo interrete aŭ alimaniere. Li esperas ke en venonta kongresa aliĝilo denove estos loko por menciigi la profesion kaj retadreson: tio plifaciligus kontaktojn.

Krome i.a. parolis André Weber (sisteme menciit www.esperanto.org sur produktoj), G. Grattapaglia (Rotarianoj), Rapley (fakaj asocioj sendu siajn informoj al La Kvinpetalo por ties kursanoj), Carmen Hernández (Kuba Esperanta Medicina Agado: aranĝo en majo 2000) kaj Jenifer Bishop (reta diskutlisto por E-instruistoj).

Fakkunsido de IKEF en la azia kongreso (Hanojo, Vjetnamio)

(24 aŭgusto 1999, 14.00-15.20 h)

Ĉeestis 9 personoj; prezidis kaj raportis Yamasaki.

Je la difinita horo neniu aperis. Poste venis 2 IKEF-membroj: OHBA Atsuo kaj Josep FRANQUESA. Tri ne konsistigas konferencon, kaj ni babiladis. Iom poste envenis vietnamaj junuloj kaj junulinoj. Kiam ni petis ilin enskribi siajn nomon kaj kongresnumeron, ili respondis ke ili estas "helpantoj" kaj ne havas KN.

Montriĝis ke ili estas studentoj kaj "helpis", ne aliĝinte kiel plenaj partoprenantoj, kaj ĉar ili ekhavis iom da intervalo inter laboro kaj ĉar ili estas interesataj pri ekonomiko kaj administrado, ili volis ĉeesti. La kunsido fariĝis sesio de informado pri IKEF. Ni klarigis pri nia organizo kaj la stato de uzo de Esperanto en komerco.

Ni eksplikis kiel parton de niaj taskoj terminaran laboron, kaj la sesio ŝanĝiĝis en universitatan seminarion pri ekonomiko, ni tri alterne "prelegis" ke jara produkta agado rezultas en varojn kaj servojn ktp ktp.

Ni ne pensis ke nia kunsido fiaskis. Ili diris ke ili estas studentoj de la universitato de Hanojo, verŝajne unu el la elitaj lernejoj, kaj fervore demandis nin pri diversaj temoj. La junuloj estas nia espero, kaj tiel estas ili. Tiu ĉi lando estas ankoraŭ malriĉa, sed ili klopodos fari el ĝi riĉan landon. Mi intencas sendi al ili studmaterialojn. Ni tri estas kontentaj ke ni kontribuis en modesta maniero al la progreso ĝenerale kaj por esperanto speciale.

YS

SIKA (ĵaŭdo 5 aŭgusto 1999, 13.30 h, gvidis René Ballaguy)

SIKA (mallongigo de 'interŝanĝoj senmonaj kaj kreditoj alternativaj'), estas asocio laŭ franca leĝo de 1901 kaj klopodas en Esperantujo kunordigi funkciadon de SIL-projektoj (senmona interŝanĝo loka; angle: LETS, france SEL: système d'échange local, germane: Tauschringe).

SIL origine ekestis en Vancouver, Kanado. Ekde 5 jaroj funkcias en Francio (nun estas 300 francaj grupoj). Por taksi la valoron de la ene de la grupo interŝanĝataj varoj kaj servoj estas uzata fikciaj monuoj. Ĉar ĉiuj grupo havas sian propran monunuon, interŝanĝo inter grupoj foje estas problemiga. La ekzistantaj problemoj (nigra laboro, taksoj) en Francio estas grandparte solvitaj.

SIKA unuafoje kunvenis pasintjare, antaŭ la UK, kun 70 partoprenantoj. La asocio intertempe havas juran statuson, estas rekonita de UEA, sed funkcias fakte nur surpapere. Depost 1998 venis tre malmultaj reagoj.

En la sama kunveno estis ankaŭ menciita ATTAC, movado de franca origino kiu celas informi por la internacia financa sistemo, denunci fiaĵojn, kaj per iu takso (Tobin-takso) klopodi limigi la senbridaajn financajn monfluojn tra la mondo. Oni bezonas tradukantojn por diskonigi la ideojn, sed ne estas mono por pagi ilin.

Lastminute

VVIA (Flandra Asocio por Industria Arĥeologio) organizos Eŭropan Konferencon je 12-14 novembro 1999. Vidu www.conservare.be/vvia. (rr)

Eŭropa Unio en Interreto

EU kreis unu centran adreson kie entreprenoj povas akiri ĉiajn utilajn informojn: <http://europa.eu.int/business>.

La novaj adjukoj en EU-regiono troveblas je:
<http://ted.eur-op.eu.int>.

Eŭropa agentejo registras kunlaborontojn

La Eŭropa Agentejo por Sekureco kaj Sano je la Laborloko serĉas interesitajn firmaojn por plenumi diversajn taskojn: esplorojn, preparo de kampanjoj, interretservojn, k.a. Kiu volas esti en registro de eblaj kunkontraktantoj kandidatiĝu ĝis 27 majo 2000. Adreso: Gran Via 33, E-48009 BILBAO, Hispanio; fakso (34-4)944.794.383, <[information\(a\)eu-osha.es](mailto:information(a)eu-osha.es)>, www.eu-osha.es/.

Staĝoj ĉe EU-instancoj

Por junuloj (ĝis 30jaraj) kun universitata diplomo eblas kvinmonataj staĝoj ĉe diversaj eŭropaj instancoj. Informoj: http://europa.eu.int/comm/sg/stages/index_en.htm.

AW/KN1222

La Ekonomia kaj Sociala Komitato (ESK) de la Eŭropa Unio

La ESK estas konsilanta organo por la Eŭropaj Komisiono, Konsilio kaj Parlamento. Ĝi konsistas el reprezentantoj de i.a. organizoj de dungantoj, dungitoj, konsumantoj, agrikulturo, fakoj, ktp. Ĝi ne estas politika organizo. Prepare al plilarĝigo de la Unio, ĝi ankaŭ ligas kontaktojn kun organizoj en landoj de meza kaj orienta Eŭropo.

Al junuloj ĝi ofertas staĝojn de unu ĝis kvin monatoj. Kandidatoj venu de universitatoj kaj de publika aŭ privata sektoro kaj havu jam iom da sperto pri la kampoj en kiuj aktivas ESK. Borsoj (François Staedelin-programo) estas je dispono de junuloj reprezentantaj fakgrupojn aŭ sindikatojn, dezirantaj fari esplorojn sur sociaj-ekonomiaj terenoj. Interrete: www.esc.eu.int.

Distribua Ekonomio

La broŝuro 'La tria vojo' (tradukita el franca lingvo: 'La troisième voie') skizas principojn de tria ekonomia vojo, inter la diktaturo de financaj merkatoj kaj malaperinta pseŭda komunismo. Havebla ĉe la tradukinto, René BALLAGUY, 12 rue Commandant Cousteau, F-95000 BOISEMONT, <[rene.ballaguy\(a\)wanadoo.fr](mailto:rene.ballaguy(a)wanadoo.fr)>. A5, 26 p. Prezo: 20 FRF (ĉ. 3 EUR).

Komercaj petoj kaj proponoj

Angolo

Mi serĉas partnerojn por kunlaboro pri: aera kaj mara transporto, industria fiŝado, minaĵoj (oro, petrolo kruda [ekspluado kaj servoj]), agrikulturo, ligno, konstruado. Mi volas importi gevirajn vestaĵojn, manĝaĵojn (ekz. rizon), k.t.p. Ofertoj kaj katalogoj estas bonvenaj. S-ro J.C. Tukifimpa-Nsoko, C.P. 399 Luanda, Angola; fakso 00244-2-397731 / 397033

Germanio

- Pres-ofset-maŝino uzataj. Ekz. Heidelberg GTO ZP 52; 2 koloroj, jaro 1991, formato 36 x 52 cm, 24 milionoj da drukoj
 - Mueliloj (ĝis 12 t/h) por viando, produktado de medikamentoj, farboj, papero kaj preparo de asfalto kun kaŭcuko (SBS)
 - Pendol-mueliloj (ĝis 30 t/h) por fosfatoj, kalkŝtonoj, anhidrido, ktp. (sed ne ercoj)
 - Malgrandaj fornoj por kunfandi neferajn metalojn
 - Industria farbo kontraŭ korodado por betono kaj ŝtalo
 - Instaloj por purigi la akvon el oleo, graso, benzino, ktp.
- Jan DZIURKA, D-41065 Mönchengladbach, fakso +49-2161-209008.

Kongo (Dem.Resp.)

Mi deziras aĉeti bonpreze uzitajn ŝuojn kaj vestaĵojn. Handikapuloj de nia klubo vendas belajn karton kun E- kaj afrikanecaj motivoj, ceramikaĵojn, skulptaĵojn el nigra lignaĵo. S-ro Emilo MALANDA NIANGA, Esperanto Kultura Movado (EKM), Université de Kinshasa, B.P. 839, Kinshasa XI.

Rusio

S-ro Andrei Botchkarev (IKEF 203), °1964, entreprenisto, Box 1988, 634063, TOMSK-43, telefono: +7-3822-42-59-98, fakso je sama numero de 03.00-11.00 GMT, rete <[andy\(a\)cold.tomsk.ru](mailto:andy(a)cold.tomsk.ru)>, proponas: tradukojn,

konsultojn, perantajn servojn en siberia merkato; deziras: instruistojn kaj konsultantojn el orientaj landoj por fondataj korespondaj kursoj de fremdaj (precipe orientaj) lingvoj. Lingvaj kapabloj: angla, pola, Esperanto.

Estas serĉataj aŭtomataj vendiloj de kondomoj. S-ro Valerij Malihin, P.K. 24847, Krasnojarsk, 660133, Siberio, Rusio, rete: <sapphire(a)ns.kgtu.runnet.ru>

Ukrainio

Mi konstante aĉetados malmultkostajn uzitajn tubojn de satelittelefonoj el okcidenteŭropaj landoj "GSM 900 Standart", komputilojn "Think Pad" kaj "Note Book", printmaŝinojn, diversajn konsistpartojn de komputiloj kaj elektrovarojn (polvosuĉilojn, harsekigilojn, malvarmiĝejoj, ktp.). Sendu ofertinformon kaj prezliston al s-ro Volodymyr Hlushyk, str.Signivka 3-98, Lviv 290040, Ukrainio; tel.(0322)626815, fakso (0322)675474, rete <nickystep(a)yahoo.com>

Laborplano

Karaj gesamideanoj, membroj de IKEF!

Lastjare en nia Ĝenerala Kunveno en Montpeliero ni akceptis la

Laborplanon 1998 - 2000

kiun ni estis ellaborintaj kadre de la UEA-kampanjo 2000 por internacia lingva ordo. Tiu laborplano, kiun vi denove trovas sur la apuda paĝo, enhavas diversajn celtrafajn agadojn (celtrafe en la senco de nia laŭstatuta celo AKCEPTIGI/ ENKONDUKI ESPERANTON SUR LA KAMPOJ KOMERCO, EKONOMIO KAJ EKONOMIKO. La estraro elektis specife ĉi tiujn agadojn, ĉar ili havas realisman ŝancon por realigo.

Hodiaŭ mi volas atentigi vin al cifero 1.4.1 b):

altigo de membronombro al 200 (fine 1998 = 136)
moto: "Ĉiu membro varbu novan membron".

Do, karaj gesamideanoj, mi invitas vin ĉiujn al tio. Bonvolu pripensi, kiu el viaj Esperantistaj konatoj povas esti valora membro de IKEF, kaj se vi trovas iun, alparolu lin/ŝin pri membreco en IKEF. Por pli praktike realigiti tion, vi ricevas aldone ekzempleron de nia informfolio, en kiu troviĝas argumentoj kaj celoj por IKEF kaj ankaŭ aliĝilon kiu post plenigo estu sendota al nia membrar-administranto s-ro Rotsaert.

En elserĉado de taŭga membro-kandidato bonvolu konsideri du neprajn kondiĉojn por membro:

- 1) Lia/ŝia profesia laboro aŭ/kaj personaj inklinoj/hobio/spertoj devas almenaŭ en plej vasta senco rilati al komerco/ekonomio/ekonomiko.
- 2) Li/ŝi devas esti kapabla pagi ĉiujare la kotizon.

Nia sperto montras ke, se tiuj kondiĉoj ne estas plenumitaj, tia membro estas efemera, kaj baldaŭ sekvas ekŝiĝo/eksigo.

Do mi deziras al vi multe da sukceso por via trovo de novaj membroj. Espereble ni povos raporti fine de ĉi tiu jaro pri

IKEF-LABORPLANO 1998-2000, kadre de UEA-Kampanjo 2000 por internacia lingva ordo, aprobita dum la Ĝenerala kunveno de IKEF			
cif. UEA	speco de agado	responsulo	
		↓ prioritato!	
1.4.1	Kampanjo "por pli vasta verdujo" Pligrandigi la membraron de IKEF a) Difino de celgrupoj varbotaj Ĉiuj homoj, kies profesio aŭ pangajna laboro rilatas al komerco, ekonomio kaj ekonomiko b) Difino de membronombro atinginda 200 membroj ĝis fino de 2000 - moto: Ĉiu membro varbu novan membron - sendigi varbleteron tra UEA al Ĉiuj UEA-membroj, kies profesio rilatas al nia fako c) Krei argumentaron por "vendi" IKEF al siaj celgrupoj; establi laborgrupon por tio	estraro	1
		estraro	1
		Ĉiuj m.	1
		prez. FJB	1
		prez. FJB	2
1.4.2	Celtrafaj IKEF-aj agadoj a) Okazigi vizitojn dum UK-semajnoj ĉe lokaj entreprenoj kaj/aŭ ekonomiaj institutoj b) Okazigi similajn vizitojn dum aliaj Esperanto-aranĝoj, kondiĉe ke almenaŭ tri IKEF-membroj ĉeestas la aranĝon c) Havigi reklamanoncon de entreprenoj al E-gazetoj d) Instigi kaj subteni negocon inter E-istaj komercistoj e) Terminara laboro f) Verki fakajn artikolojn en E-gazetoj	prez. FJB	1
		koncernataj membroj	2
		Ĉiuj membroj	1
		Ĉiuj membroj	1
		Yamasaki membroj k.	1
		ĵurnallisma talento	1
2.1.1	Disvastigo de informoj pri E-o, UEA kaj IKEF a) Regule ĝisdatigi kaj ampleksigi la IKEF-ajn informpaĝojn en TTT b) Plibonigo/plirapidigo de la komunikado inter membroj per uzo de retroŝto c) Produkti nian IKEF-informilon E-lingvan ankaŭ en la plej gravaj naciaj lingvoj; krome tiaj tekstoj aperu in interreto d) Post ricevo de la plej bonaj informiloj nun ekzistantaj kaj tradukeblaj el naciaj lingvoj, kiujn la UEA-estraro elektos, ni kunhelpos al traduko kaj disvastigo (nur de tiuj kiuj iom rilatas al nia fako)	B. Holm	1
		Ĉiuj membroj	1
		redaktoro RR	2
		Yamasaki S.	3

3.5	Kontaktoj kun ekstermovadaj instancoj, kies aktivecoj rilatas al la celoj de IKEF a) Komisiono de EU - Ekonomia Direkcio b) Naciaj ministerioj pri ekonomio c) Ekonomia fakultato de universitatoj kaj komercaj altlernejoj d) Komercaj Ĉambroj	M. Cwik prez. FJB sciencisto j pri ekonomio membroj kun kontaktoj al K.Ĉ.	2
			3
			2
			2

Novaj membroj

284. S-ro Giorgio BRONZETTI, Via Aldo Moro 37, I-66100 CHIETI, Italio, tel. 0871 561301, rete <BRONZETT(a)VEGA.CHIETI.COM>
285. Dipl.-Ing. Hans Peter BARTOS, BARTOS Gesundheits-Systeme, Blumenstr. 17, D-06108 HALLE (SAALE), Germanio, °1956, tel. private 0345-503117, oficeje 0345-21133-44, fakso 0345-2113355, rete <sotrabgs(a)aol.com>
286. S-ro Sadeg KARAMI, P.O. Box 6864, IR-15875 TEHRAN, Irano, °1975, tel.+ fakso +98 021 2086574, rete <s-karami(a)neda.net>
287. S-ro Miguel GUTIÉRREZ ADÚRIZ, Los Cotereros 1C, 2 Iz, E-39600 MURIEDAS, Hispanio, rete <liven(a)nexo.es>
288. S-ino Sanja BUKOLIC, Brestovice 12, HR-51215 KASTAV, Kroatio, °1961, tel. 051/224-720, fakso 051/224-710
289. S-ino Barbara DESPINEY, 21 Rue des Cuverons, F-92220 BAGNEUX, Francio, 290. S-ino Rosa EBEL, Kuhleshütte 21, D-47809 KREFELD, Germanio, °1952, tel. 02151-557717 (hejme), fakso 02151-392820 (oficeje)
291. S-ro Kunle KAMSON, P.O. Box 1720, Surulere, LAGOS, Nigerio, rete <kamson(a)alpha.linkserve.com>
292. S-ro XU Zhiliang - Suzhou Zhenya Group Co, Donggang Xincun 23-zhuang 107-shi, CN-215001 SUZHOU, Jiangsu, Ĉinio, tel. 512-7255454, rete <uulx3107(a)publicl.sz.js.cn>
293. S-ro Volodymyr HLUSHYK - Firmao ESPERO, str. Signivka 3-98, UA-290040 LVIV, Ukrainio, °1958, tel. (0322)626815 fakso (0322)675474, rete <nickystep(a)yahoo.com>

Reta vortaro en Esperanto

Ĉe la retadreso: <http://www.dictionaries.travlang.com> oni trovas tradukprogramon por 17 lingvoj. Unu el ili estas Esperanto, el kiu oni povas traduki al ok diversaj lingvoj kaj inverse. La vorttrezoro de la programo estas ne malgranda. Ĝi havas 54000 elirojn por la nederlanda, po ĉirkaŭ 15000 por la angla, franca, germana, portugala kaj po 2000 ĝis 6000 por la hispana, itala, norvega lingvoj. Memkompreneble ĉi tiu programo ne estas senerara, sed oni povas ĝin uzi tre utile.

Ulrich Matthias (tra Ret-Info)

La MZ-eldonejo renovigis sian retopaĝaron

Ĉe la adreso <http://www.mz-verlag.de/Esperanto/esperanto.html>

oni trovas germanlingvajn informojn pri Esperanto, sed dekstre troviĝas navigilo por la libroj eldonitaj de MZ-eldonejo. Baldaŭ tie estos legebla la unua libro senkoste en plena teksto ("Klopodu kompreni min"). Ni metis ĉiujn recenzojn pri niaj libroj, kiujn ni konas. Certe ekzistas pli kaj ni petas informi nin pri aliaj, kiujn ni ankaŭ metos al interreto. La kodigo de la paĝoj estas en Latin-3.

Harald Schicke, MZ-eldonejo <Harald.Schicke(a)t-online.de>